



Esperanto en Danio

11-a jarkolekto • n-ro 1 • januaro 2004



Jonas kaj “pli junas” Mathias Dalmose
distros nin en la Jarkunveno en Aalborg

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16
✉ dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Bent Wiinberg (vicprezidanto)
Ina Schultz (kasisto)
Jytte Sunekær (sekretario)
Ole Blaust
Werner Madsen
Torben Svendsen

Anstataŭantoj:

Bent Jensenius
Ana Røssum

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40
✉ eed@esperanto.dk

Presado:

Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

Ina Schultz
Bredagervej 21, 3.th., 2770 Kastrup
☎ 32 52 19 58.
✉ ina.schultz@get2net.dk

**Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.**

**Limdato por la venonta numero:
10.04.2004**

Enhavo

Lande

Novjara mesaĝo.....	3
Esperanto agnoskita kiel publike utila	4
Eminentaj prelegantoj en Aalborg	5
Strategia laborplano 2003-5....	6
Senpaga telefonado	7

Loke

Næstved	8
Aalborg	9
Århus	9
Kopenhago.....	10
Du intensaj laborsemajnoj	13
Lapenna-arkivo nun en la Dana Ŝtata Arkivo	15
Forpasis honora membro	17

Monde

Komitato por eksperimentado de la Internacia Lingvo	19
Zamenhof-tago tutmonde.....	20
28a IJF	21
‘Eniro al Tibeto’	22
“Aroma Jalto” 2004.....	22
Auld kandidato por Nobel	23
Esperanto-ĵazo furoras.....	23

Anonco

El la bretaro de Libroservo...	24
---------------------------------------	-----------

Lande

Novjara mesaĝo de la prezidanto

En ĉi tiu komenca monato de la nova jaro 2004 mi deziras al ĉiuj membroj kaj legantoj de EeD ke la nova jaro alportu al vi ĝojon, bonfarton kaj prosperon!

Mi dankas la estraranojn de DEA, la prezidantojn kaj estraranojn de niaj kluboj, kaj ĉiujn aktivulojn pro ilia agado dum la lasta jaro, kaj fidas ke la nova jaro kunportos prosperon kaj sukceson al nia movado.

Nia plej rimarkinda sukceso dum la lasta jaro estis la agnosko de Esperanto kiel publike utila lingvo por nacia kaj internacia interkompreno – vidu la ĉi-sekvan artikolon. Post novjaro akiris min ĝojiga informo ke EJDO (la junulara sekcio de DEA) denove aktivas!

Internacie: dum la lasta semajno de pasinta jaro atingis nin la komuniko ke oni elektis Osmo Buller kiel Ĝeneralan Direktoron de la Centra Oficejo de UEA. Tiurilate mi legis multajn bondezirojn kaj pozitivajn mesaĝojn kiujn komitatanoj de UEA sendis kun gratuloj al la nuna kaj al la nova Ĝenerala Direktoro. Tio inspiris la Prezidanton de UEA Renato Corsetti emfazi la magian momenton de tiuj mesaĝoj pro la retrovita harmonio kiu estas io tiel valora. Kaj mi tute interkonsentas kun lia opinio ke fakte, la laboro estas tiel granda, ke neniu el ni povas sola fari ĝin. Ni devas resti ĉiuj kune kaj kunlabori, ĉiu laŭ sia ebleco, ĉar ĉi tie ne ekzistas fortuloj kaj malfortuloj aŭ lertuloj kaj mallertuloj, ĉi tie ekzistas nur esperantistoj, same batalantaj ne por personaj avantaĝoj, sed por idealo!

Mia deziro estas ke ni laboru en tiu spirito atingante la deziratajn celojn. Gravaj taskoj atendas nin dum tiu ĉi jaro, interalie:

- informado al politikistoj dum la balotkampanjoj, aparte la eŭropa baloto en junio,
- kreskigo de nia membraro dum 2004,
- ni petas vi agadu por varbi “subtenantojn” inter via amikaro,
- kaj fine la deziro de la DEA-estraro ke vi partoprenu mult-nombre nian jarkunvenon la 24-25an de aprilo en la junular-gastejo de Aalborg.

Mi fidas ke ni alfrontos tiujn taskojn kun sukceso!

Samideane salutas vin

Ileana Schröder.

Esperanto agnoskita kiel publike utila

Karaj samideanoj, jen la bona novaĵo kiun ni atendis dum kelkaj monatoj: la 23-an de septembro la Fonduso por Esperanto-Domo estis oficiale agnoskita kiel publike utila institucio.

La Konsilaro pri Impost-financoj (*Ligningsrådet*) tute ĝojige por ni, agnoskis ke **“Esperanto estas lingvo samsence kiel naciaj lingvoj kaj dialektoj kaj tial povas esti utila al pli vasta rondo da personoj kiel alternative funkcia komunikilo inter popoloj de diversaj nacioj kaj lingvoj”** (vidu la originalan tekston en la kesto).

Tio do nun signifas ke la Esperanto-Fonduso dum kvin jaroj ne devas pagi impostojn kaj dum tiu periodo povas ŝpari la monon por pliatigi la kapitalon. Sed tio ankaŭ signifas ke subtenantoj povas ricevi deprenon de impostoj por sumo kiu estas pli

granda ol 500 danaj kronoj kaj ne pli granda ol 5000 kronoj jare.

La estraro strebas administri la kapitalon kiel eble plej bone, sed por atingi la celon ni bezonas ankaŭ donacojn, eĉ donacetojn.

Por rememorigi ĉiujn interesojn, la celo de la Fonduso estas aĉeti aŭ lui lokalojn por, interalie, pli kvalite konservi nian heredaĵon kaj pli profesie instrui kaj disvolvigi nian lingvon.

Karaj gelegantoj – vi certe bone komprenas ke paŝo post paŝo aŭ guto post guto povas porti nin al la celo, do mi estas certa

ke vi elektos la ĝustan agon kaj helpos al ni atingi la celon!

La ĝironumero de la fonduso estas la jena:

4230-818843

Den Danske Bank, Fonden for Esperantodomo.

Ana Røssum

“Det er Told- og Skatte- styrelsens opfattelse, at esperanto anses som et sprog på lige fod med nationalsprog og dialekter og dermed kan komme en videre kreds af personer til gode som en alternativ kommunikationsform mellem personer af forskellige nationaliteter og sprog. Erhvervelse af en ejendom, hvorfra der kan udøves informationsaktivitet og fremme af brugen af sproget, må derfor anses for et kulturelt formål af almen- nyttig karakter.”

Eminentaj prelegantoj en Aalborg

La sabatan posttagmezon de nia ĉijara jarkunveno pleningos kultura programo. Ni invitis tri eminentajn personojn, diversmaniere kompetentajn por prelegi pri lingvo, lingvopolitiko kaj Esperanto.

La unua preleganto estos *prof. Robert Phillipson* kiu (danlingve) pritraktos la problemojn kaj demandojn de lingva kaj kultura diskriminacioj fare de la grandaj naciaj lingvoj (precipe la angla) kaj la eblecojn de Esperanto demokrate influ la lingvopolitikon en Eŭropo kaj en la tuta mondo en epoko de ĝenerala tutmondiĝo kaj kreskanta lingva dominado de la grandaj naciaj lingvoj.

Due prelegos *s-ino Birthe Lappena*, kiu pritraktos la signifon de Esperanto kiel lingva instrumento kaj esprimo de “Humaneca Internaciismo” (la Zamenhofa ‘interna ideo’) kaj “Aktiva Neŭtraleco”, ambaŭ nedisigeble ligitaj al la Internacia Lingvo, Esperanto.

Fine la *lingvisto Eckhard Bick* pritraktos la projekton “VISL”, kiu temas pri komputilaj programoj taŭgaj por gramatike analizi tekstojn en naturaj lingvoj, inkluzive Esperanton.

DEA invitas ĉiujn membrojn kaj gastojn el niaj najbaraj landoj, kaj al la prelego de Robert Phillipson aparte la nemembrojn kaj neesperantistojn kiuj interesiĝas pri la lingvaj problemoj precipe en Eŭropo. La lasta libro de Phillipson estas tradukita de István Ertl kaj eldonota de UEA. Jen parto de la antaŭparolo, kiun la

aŭtoro verkis por la Esperanta eldono de sia libro:

En la lastaj ok jaroj mi daŭre havis kontakton kun Esperanto: pere de amikoj, en konferencoj, tra retpoŝto – kaj dume ĉiam pli kreskis mia konvinko ke ĉi tiu lingvo estas fonto de riĉeco, pri kiu multe pli da homoj devus scii. Esperanto estas lumturo kun disradio

tute aparta. La defio por ni ĉiuj, kaj aparte por fakaj interesatoj pri lingva politiko, estas disvastigi ĉi tiun lumon en mondo kiun malheligas tiom da konfliktoj. Esperanto estas en si mem defio al la nuranglisma pensado. Internacia lingvo en la servo de paco kaj interkompreniĝo estas eĉ pli urĝe necesa nun ol en la 19-a kaj 20-a jarcentoj.

Ileana Schröder / Torben Svendsen

Provizora tagordo de la Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio, dimanĉe la 25an de aprilo 2004

1. Elekto de kunvena gvidanto
2. Elekto de protokolanto
3. Jara raporto
4. Jara kalkulaĵo de 2003
5. Laborplano de DEA 2004-5
6. Proponoj
7. Elekto de prezidanto
8. Elekto de estraranoj kaj anstataŭantoj
9. Elekto de revizoroj kaj anstataŭanto
10. Eventualaĵoj

Strategia laborplano de DEA 2003-2005

Surbaze de la plano de UEA por nova kampanjo “al lingva demokratio” sekvas jena laborplano de DEA kiu precizigas konkretajn labortaskojn farendajn dum la periodo 2003 ĝis 2005.

La agado koncernas 3 agadkampojn:

- Informado
- Instruado
- Utiligado

kaj du agad-direktojn:

- Profesiigo
- Plijuniĝo.

Informado

Surbaze de la informa strategio de DEA, akceptita de la estraro la 24an de junio 2003, la estraro prioritatas:

- kontakton al diversaj amas-komunikiloj per dissendo de artikoloj pri esperanto;
- priparolon de la aranĝoj en gazetara rubriko “okazas...”;
- produktadon de informmaterialoj pri Esperanto por disvastigi en informcelaj agadoj.

Interreto: La estraro prioritatas la retpaĝon esperanto.dk kies redaktoro respondecas pri konstanta ĝisdatigado kun aktualaj informoj pri Esperanto kaj ligiloj al aliaj gravaj retpaĝaroj.

Esperanto-Nyt: La estraro apogas la eldonadon de Esperanto-nyt kaj

dissendas ĝin al sia membraro kaj unuopaj interesiĝantoj.

Instruado

La estraro apogu kaj instigu, kaj laŭ la eblecoj helpu ankaŭ ekonomie, la aranĝadon de tradiciaj kursoj por komencantoj kaj daŭrigantoj minimume unu fojon jare.

La estraro apogas evoluigon de komputil-reta kurso kaj koresponda kurso.

La estraro apogas eldonojn de vortaroj kaj lernolibroj.

Agad-direkto profesiigo: Varbo kaj aktivigo de universitataj instruistoj por ellabori stud-programojn pri Esperanto je universitata nivelo, precipe en RUC.

Utiligado

La estraro instigu la lokajn societojn fari laborplanon kun diversspecaj allogaj aranĝoj por aktivigi la membraron.

Organizi jarkunvenon kun alloga programo.

Plifortigi la movadon varbante novajn membrojn.

Agad-direkto plijuniĝo: La estraro apogu aktivigon de EJDO kaj organizu jarkunvenon kaj agadojn allogajn al junuloj.

Plani viziton en lernejoj por informi pri Esperanto.

Senpaga telefonado

Danaj esperantistoj telefonos senpage unu al alia – kaj samtempe subtenos DEA-n

DEA povas nun helpi siajn membrojn ŝpari monon en la telefona fakturo kaj eĉ telefoni senpage al aliaj geamikoj, se ili ankaŭ fariĝos klientoj ĉe DEA.

Estante DEA-kliento vi ŝparos de 12% ĝis 28% (kompare kun TDC), kaj samtempe vi subtenos DEA-n kun 2-8% de via telefonfaktura sumo (sen pagi eĉ unu kronon pli!). Tio signifas ke kiam vi nun telefone parolas por 100 dkr. monate, vi sparus 12-28 dkr., DEA ricevos 2-8 dkr., kaj ESPERTEL ricevos 0,25 dkr.

Tio eblas ĉar DEA kunlaboros kun ESPERTEL kaj granda internacia telefonkompanio ACN, kiuj ofertas altkvalitan telefonadon. Momente temas pri hejma telefono, sed tre baldaŭ oni ankaŭ ofertas malmultekostan telefonadon per via portebla telefono. ESPERTEL estas unuigita fondita de Bent Holm, kun la celo havigi monon al la Esperanto-movado.

La internacia telekompanio estas rekonita de “Telestyrelsen”. Ĉi tiu aranĝo donos eblecon al DEA plilarĝigi siajn aktivecojn kun pluraj promesplenaj novaj iniciatoj, kiuj meritas nian subtenon.

Praktikaj informoj: Vi (daŭre) pagos abonon al Teledanmark (TDC) aŭ alia telefonkompanio kie vi nun estas abonanto, kaj ŝparos je la farotaj paroladoj. Baldaŭ oni ankaŭ ofertas abonadon, tiel ke vi povos ŝpari pli da mono! Vi aliĝas al Espertel kontaktante Bent Holm, kaj li sendos al vi aliĝilon, kiun vi plenigos kaj resendos al li. **Vi ne estos ligita**, vi povas ĉiam reveni al via nuna telekompanio post 30 tagoj informante Espertel pri via deziro!

Do, prenu la okazon helpi nian movadon kaj viajn telefonrilatojn kun viaj amikoj ĉar kiel supre menciite ankaŭ ne-esperantistoj povas aboni kaj tiamaniere apogi nin. La estraro de DEA apogas la ideon! Bonvolu kontakti Bent Holm, telefonnumero: 40 27 34 51, retpoŝto: bent.holm@teamholm.dk.

Bent Holm

Loke

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Fyrrevænget 4, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.

La kunvenoj okazas vendrede en *Grønnegades kaserne, Grønnegade 10, lokalo 111*, ekde 19.30.

Okazos:

23.01: Traduklaboro pri fabelo de H.C. Andersen.

30.01: Lene kaj Jan Niemann pri muzeoj kaj aliaj travivaĵoj en Florenco. Lumbildprelego.

06.02: Traduklaboro pri fabelo de H.C. Andersen.

13.02: Ĝenerala kunveno de EUN.

20.02: Traduklaboro pri fabelo de H.C. Andersen.

27.02: Ileana Schrøder, prezidanto de DEA, pri la estonteco de DEA kaj de UEA.

05.03: Traduklaboro pri fabelo de H.C. Andersen.

12.03: Liss-Lotte Talbro, Odense, rakontos pri siaj vizitoj en Litovio.

19.03: Traduklaboro pri fabelo de H.C. Andersen.

26.03: Birthe Trærup: Prelego kun lumbildoj kaj videofilmo + sezonfino.

NB. Ŝanĝoj de programeroj povos okazi kaj en ekstremaj kazoj nuligo de iu kunveno.

Okazis:

24.10: Sisse Gry Olsen vigle kaj kompetente rakontis kaj montris fotojn pri siaj travivaĵoj en Bolivio, kie ŝi laboris en infanvartejo kaj inter stratinfanoj dum kelkaj monatoj. Plurajn ceterajn vendredojn ni daŭrigis la laboron pri fabeloj de H.C. Andersen, kiun taskon ni reprenas nun en 2004. – 12.12. ni ujutnis per spicita ruĝa vino, ĵetkub-ludo kaj aliaj amuzaĵoj. Post tio ni julferiis ĝis la 9a de januaro.

E. Henning Olsen

Aalborg

4.2. je la 19.30: Vizitos nin Ileana Schrøder, prezidanto de DEA, kaj ni invitas ĉiujn membrojn. La kunveno okazos en Christiansgade 39,1. Ileana rakontos pri la situacio en Danio kaj la venonta jar-kunveno en la Junulargastejo de Aalborg.

Ejnar Hjorth

Århus

Prezidanto: Stanisław Mielczarek, Skovgårdsvænget 125,
8310 Tranbjerg J.; tel./fakso: 86 29 23 06.

Kunvenejo: Senior-Centret, Østergade 30, 2., 8000 Århus C.

Kunvenoj: je la 19.30 h.

Okazos:

- 29.01:** **Ileana Schrøder**, la nova prezidantino de Dana Esperanto-Asocio vizitos nian klubon! Venu do ĉiuj, por ekkoni la prezidantinon, ŝiajn planojn pri la Esperanto-movado en Danlando ktp. Ĉi-vespere ni havos ankaŭ eblecon por esprimi niajn opiniojn, dezirojn pri la Esperanto-movado en nia lando, doni konsilojn ktp.
- 26.02:** **Ĝenerala kunveno.**
- 25.03: “Ĉu mi mem povas diri: mi parolas Esperanton?”
- 29.04: “La nova Eŭropa Unio”. La 1-an de majo 2004 Eŭropa Unio pligrandiĝos. Tiun vesperon ni diskutos pri plusoj kaj minusoj de tiu evento.
- 27.05: “La internacia lingvo – muziko”. Jonas kaj Mathias Dalmose prelegetas kaj muzikas.
- 11.06: Tradicia somerekskurso.

Stanisław Mielczarek

Kopenhago

La kluboj **KEK kaj DEFA-Kopenhago** kunvenas en *Banestyrelsen, Vasbygade 10*, ĉiun lundon ekde 19.30 h. Kontaktuloj: KEK ĉe Jytte Sunekær, ☎ 4448 4726 – DEFA ĉe Astrid Birkbak, ☎ 4497 4329.

En la retbabilejo, kiu funkcias en la klubejo ĉiulunde, eblas nun por la kluboj sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ili havas la jenan interretan adreson: defakek@hotmail.com.

Rakontu pri tiu adreso al viaj esperanto-rilatuloj. Ni esperas ke ĝi faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

Unufoje monate, je la 19a horo, okazas prelego en la **Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG)** en publika kunvenejo de la biblioteko ĉe Danasvej 30B, dua etaĝo. Detaloj haveblas ĉe Torben Svendsen, Vanløse Allé 57, 2720 Vanløse, ☎ 3874 9764 – kaj *bonvolu noti lian novan retadreson*: tsvendsen@webspeed.dk.

Kursoj kaj studgrupoj

KEK/DEFA ofertas por la printempa sezono la jenon rilate al kursoj kaj studgrupoj:

Kurso por komencantoj kaj kurso por progresantoj:

5/1, 12/1, 19/1, 26/1, 2/2, 9/2, 16/2, 1/3, 8/3, 15/3, 22/3, 29/3.

Instruas la komencantojn: Bent Jensenius.

Instruas la progresantojn: Amir Hadžiahmetović.

La kursoj konsistas el 12 x 2 lecionoj, instruhoroj 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45.

Prezo: 250 kr.

Legogrupo por tiuj, kiuj ricevis instruadon kaj ŝatus legi tutan libron kaj diskuti la enhavon:

19/1, 26/1, 2/2, 9/2, 16/2, 1/3, 8/3, 15/3, 22/3, 29/3.

La grupon gvidas Arne Casper. Oni legas dum dek vesperoj inter la horoj 19.00-19.45 kaj 20.00-20.45.

Prezo: por membroj de KEK la partopreno estas senpaga.

Studgrupo duflanka – ni diskutos, ĉu ni simple dividiĝu en du grupojn:

H.C.Andersen 200-jariĝus en 2005 – ni tradukos fabelojn de li.
Boris Kolker: ‘Vojaĝo en Esperanto-lando’.
Informoj ĉe Lene Niemann kaj Bent Wiinberg.
La grupo funkcias ĉiun duan lundon (alterne kun programoj) inter la
horoj 20.00-20.45 kaj 21.00-21.45.

Programo de januaro ĝis marto 2004

(KEK/DEFA kie ne estas indikita KEKG).

19/1 – Kursoj, legogrupoj kaj studgrupoj

26/1 – Kursoj kaj legogrupoj

Programo: Bjarke Nielsen prelegos pri la temo: ‘*Indianoj*’.

2/2 – je horo 18.30: Komuna manĝado – mendu buterpanojn ĉe
Ruth, tel. 36 46 62 79, aŭ kunportu mem vian manĝaĵon.

Kursoj, legogrupoj kaj studgrupoj

9/2 – Kursoj kaj legogrupoj

Programo: Jan rakontos al ni pri la eblecoj, kiujn donas al ni
la *Interreto* – retpoŝto, www.gxangalo.com ktp. Poste vi
povos ‘praktiki’ (nur du homoj samtempe), kaj dum vi ne
sidos ĉe la ekrano, vi povos studi Esperantajn esprimojn pri
komputiloj kaj interreto.

11/2 – KEKG: ‘*Mallonga historio pri la baltaj landoj kaj Baltaj
Esperanto-Tagoj*’. Prelego de Eugeniusz Rybarczyk.

16/2 – Kursoj, legogrupoj kaj studgrupoj

23/2 – **Ĝeneralkunveno de KEK**. Nemembroj estas bonvenaj ĉeesti
Por tiuj, kiuj *ne* ŝatas ĉeesti, ni havas diversajn ludojn kaj
taskojn.

1/3 – je horo 18.30: Komuna manĝado – mendu buterpanojn ĉe
Ruth, tel. 36 46 62 79, aŭ kunportu mem vian manĝaĵon.

Kursoj, legogrupoj kaj studgrupoj

8/3 – Kursoj kaj legogrupoj

Programo: ‘*Kial vi fariĝis esperantisto?*’

Pripensu iomete, kaj rakontu al la aliaj – certe ni ekscios
‘novaĵojn’ pri la samklubanoj ...

10/3 – KEKG: ‘*La opero Evginij Onegin de P. Ĉajkovskij*’. Prelego
de Birthe Trærup – akompanota per muzikekzemploj.

15/3 – Kursoj, legogrupoj kaj studgrupoj

- 22/3 – Ni rigardos televidprogramon brazilan pri ‘Bona Espero’, kaj poste Astrid kaj Erik, kiuj vizitis la lokon (kvankam antaŭ kelkaj jaroj) respondos demandojn.
- 29/3 – Kursoj, legogrupoj kaj studgrupoj.
- 5/4 – Informoj pri la 89a UK en Pekino kaj la 6a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso en Bilbao laŭ la duaj bultenoj.
- 14/4 – Prelego en KEKG – temo kaj preleganto fiksitaj.

Ŝanĝoj povos okazi.

Jytte Sunekær / Lene Niemann / Torben Svendsen

Okazis

Ŝajne okazis tiel multe ĉirkaŭ la jarŝanĝo ke homoj rezignis sendi raportojn – jen do nur mallonga resumo:

Merkrede la 3an de decembro en KEKG Eliza Kehlet interese rakontis pri sia vivo en Belgio kiel interpretisto en la EU-parlamento.



Situacio en la Zamenhof-vespero: sveda gasto parolas kun preleginto, dum muzikinto vicostaras ĉe la libroservo.

Samloke la 13an de decembro okazis sukcesa Zamenhofvespero. Parolis Mogens Rude Andersen, Maria Henriksen kaj Mogens Groth, kaj muzikis la fratoj Dal-mose. Lunde la 5an de januaro vizitis nin en KEK/DEFA ges-roj Fornal kun prelego pri Lidja Zamenhof (filino de la majstro) kaj deklamado de poemoj. Samloke la semajnon poste vizitis nin la rusa aŭtoro kaj kantisto Mikaelo Bronŝtejn. Merkrede la 14an de januaro Mogens Rude Andersen prelegis en KEKG pri sia rolo kiel gastinstruisto en unu finna baz-

lernejo, kie Esperanto estis oficiala, deviga lernfako ekde la 2a klaso dum nombro da jaroj de post 1958. Ĉi-sekve vi povas legi lian propran resumon de la prelego.

Jens S. Larsen



Mogens Rude Andersen:

Du intensaj laborsemajnoj

1963

en

2003

Finnlando

1963:

- *Instruado* de Esperanto al la 2a ĝis la 5a/6a klasoj de Rauvolan koulu, baznivela popola lernejo (1-6) 5 km oriente de Turku.
- *Vizito* fare de la lerneja kontrola inspektoro.
- *Vespera aranĝo* por lernantoj kaj iliaj gepatroj (filmo kaj lumbildoj pri Danlando).
- *Informado* pri la Internacia Lingvo al la 200 gestudentoj ĉe la Pedagogia Altlernejo de Turku. Tradukis s-ro *Pauli Riihivaara*, orgenisto ĉe la Katedralo de Turku.
- *Prelegoj* pri Danlando en 3 Esperanto-kluboj kaj en geinstruista societo.
- *Gazetara kunveno* kun demonstra leciono. Favoraj artikoloj en 6 lokaj kaj 3 ĉefurbaj tag-gazetoj.
- Turistumado kaj diversaj vizitoj.

2003:

- *Instruado* de astronomio al 4a klaso de *Piispanristin koulu*, baznivela popola lernejo 5-6 km oriente de Turku. – La lernantoj faris simplan aparaton, per kiu oni facile povas ‘nombri’ la stelojn de la ĉielo. Poste mi rakontis pri nomoj, mitoj kaj legendoj ligitaj al la konstelacio de la Granda Ursino. La instruado okazis pere de Esperanto; tradukis s-ro *Jorma Ahomäki*.
- *Vespera aranĝo* en la malnova observatorio de Turku, kie dum multaj jaroj laboris prof. *Yrjö Väisälä* (1891-1971), tre varma adepto de la Intemacia Lingvo. Interpretis juna esperantisto, s-ro *Mikko Mäkitalo*.

- *(Ne)rekta informado* pri la Internacia Lingvo sur stratoj, en aŭtobusoj, butikoj kaj restoracioj. Ĝenerale montrigis granda respekto por Esperanto.
- *Prelego* en Turku kaj en Tampere: ‘Esperanto ja estas cigaro! – 50 jaroj kun la Internacia Lingvo.’
- *Renkontiĝo* kun ‘Kato’ kaj ‘Konvalo’, du el miaj gelernantoj en Rauvolan koulu aŭtune 1963. Ili ne plu parolas Esperanton, sed tamen komprenis preskaŭ ĉion, kion mi diris. La lernado ĉesis, kiam ili post la 6a klaso devis ŝanĝi al alia lernejo. ‘Konvalo’ uzis la lingvon ĝis la 18-jariĝo korespondante kun du samaĝulinoj el Hungario kaj Britio.
- *Tuttaga ekskurso* al la insularo apud Turku, i.a. al *Norrskata*, kie mi somere 1964 partoprenis en la fojnorikolto. Bonan lingvan ekzercadon spertis s-ro *Väinö Havu*, nova esperantisto, emerita profesoro pri dermatologio (haŭtmalsanoj) ĉe la Universitata Hospitalo de Turku.
- *Favora artikolo* pri la 40-jara kontakto/kunlaboro finna-dana aperis en la semajna novaĵ-gazeto ‘Kaarina’. Ĝin verkis la jurnalistino Susanne Laineenkare, kiu ĉeestis mian instruadon al la 4a klaso kaj la postan renkontiĝon kun ‘Kato’ kaj ‘Konvalo’.
- *Turistumado* kaj diversaj vizitoj.

Ambaŭ laborsemajnojn brile organizis s-ro *Jorma Ahomäki*, Piispanristi.



La Dana Ŝtata Arkivo en Kopenhago

Lapenna-arkivo nun en la Dana Ŝtata Arkivo



La 19-an de novembro 2003 mi transdonis la arkivon de Prof. D-ro

Ivo Lapenna, mia forpasinta edzo, al la Dana Ŝtata Arkivo (*Rigsarkivet*), kiu situas en la koro de Kopenhago ĉe la Dana Parlamentejo en Kastelo Christiansborg.

Antaŭ 11 jaroj mi kontaktis la Direktoron de la Arkivo kaj pensis, ke nun mi devas peti tiun institucion akcepti la arkivon de eksterlandano. Kutime oni akceptas materialon nur de danoj. La tiam juna direktoro demandis, pri kiu persono temas. Kiam li aŭdis la nomon, li tuj diris, ke Prof. Ivo Lapenna ja estas monde konata sciencisto, kaj kompreneble ni kun plezuro akceptas lian arkivon. Tiam mi diris, ke temas ne nur pri materialo, kiu koncernas juron, sed ankaŭ pri materialo, kiu koncernas la Internacian Lingvon, Esperanto. La Direktoro respondis, ke Esperanto ja estas monda kulturhistorio. Kiom da spaco vi bezonas, li demandis. Mi

respondis, ke mi ne scias, sed temas pri sufiĉe multe da materialo. Li diris: Vi povas havi tiom da spaco, kiom vi bezonas, kaj ekde nun vi ne plu demandu nin, sed de tempo al tempo ni petos vin liveri la arkivaĵojn. Dum proksimume unuhora interbabilado ni trinkis kafon en lia granda, bela salono sidante sur bluaj apogseĝoj. Mi estis tre feliĉa pro tiu ĉi bela akcepto.

La jaroj pasis ... kaj de tempo al tempo la ĉefo de la departemento de la Dana Ŝtata Arkivo telefonis al mi por demandi, kiam mi intencas liveri la arkivon de Prof. Lapenna. Ĉiufoje mi devis informi, ke mi ankoraŭ bezonas ĝin pro la multaj sciencistoj el la tuta mondo (ekster la Esperanto-Movado) kaj ankaŭ pro la “Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna”, kiuj ĉiuj daŭre bezonas informojn. Malgraŭ tio, ke oni ankoraŭ petas informojn, mi tamen fine pretigis la arkivon kaj vokis la ĉefon por diri, ke nun 16 grandegaj kestoj estas pretaj. Efektive oni estis tre kontentaj kaj tuj sendis

ŝarĝaŭton de la Dana Ŝtata Arkivo por preni ilin.

Tuj post la akcepto de la arkivo de Ivo Lapenna la ĉefo, kiu estas d-ro pri filozofio, sendis al mi belan dankleteron.


Kiam seriozaj historiistoj kaj aliaj personoj deziros konsulti la arkivon de Ivo Lapenna, oni vokos min de la Dana Ŝtata Arkivo por aŭdi, ĉu mi permesas, ke tiuj personoj studu lian arkivon.

Do, la arkivo de Ivo Lapenna nun estas por eterne perfekte prizorgata. Mi antaŭĝojas la momenton, kiam aperos kompetenta kaj sincera

historiisto, kiu kapablos verki aŭtentikan historion pri la Internacia Lingvo. Sendiskute la arkivo de Ivo Lapenna estas vera trezoro, kiu – pro la abunda dokumentaro – facile povas “rebat” la daŭre multajn misprezentojn, kiujn de tempo al tempo oni povas legi en la Esperanto-gazetaro.

La fakto estas, ke la verko de Ivo Lapenna parolas per si mem kaj estas avide studata ne nur nun, sed ankaŭ – kaj tutcerte eĉ pli – en la estonteco.

Birthe Lapenna



Noticoj en Jyllands-Posten kaj Politiken pri la transdono de la arkivo

Forpasis honora membro

Mallongan tempon antaŭ sia 90-jariĝo mortis en la maljunulejo “Bakkegaarden” en Århus Jenny Jørgensen – honora membro de Århus Esperantoforening kaj de Dana Esperanto-Asocio.

Jenny naskiĝis en malgranda urbo en Mez-Jutlando. En sia juneco ŝi estis dum multaj jaroj servistino en la domo de la direktoro de la bierfarejo en Silkeborg. Tie kolegino interesigis ŝin pri Esperanto; ŝi lernis la lingvon kaj komencis partopreni en la kluba vivo. Tiam estis ja bona Esperantoklubo en Silkeborg.

Sed Jenny ankaŭ havis aliajn interesojn, interalie popoldancadon. Tie ŝi renkontis junan maŝiniston, kiu ankaŭ laboris en Silkeborg, Povl Jørgensen. Ili geedziĝis en 1944 kaj la saman jaron ili translokiĝis al Århus, Tordenskjoldsgade 2, kie Jenny loĝis ĝis sia malfrua maljuneco.

Povl Jørgensen rapide ekrimarkis la eblecojn en Esperanto. Ankaŭ li eklernis la lingvon – ĝis granda perfekteco, tiel ke li mem povis instrui. Li fariĝis prezidanto de la Århus-a klubo, kaj dum multaj jaroj li samtempe funkciis kiel kluba kasisto kaj redaktanto de la kluba “Informilo”. Kaj en la landa movado li estis dum multaj jaroj kasisto de DEA.

Esperanto estis granda parto de la vivo en tiu familio; kaj Jenny ĉiam partoprenis en klubaj kunvenoj, agadis en la estraro, partoprenis kongresojn en Danio aŭ en aliaj landoj. Ŝia gastameco estis preskaŭ sen limoj, gastoj el la tuta mondo trovis bonan manĝaĵon kaj liton – aŭ sofon – en Tordenskjoldsgade 2, ne nur por unu aŭ du tagoj, sed kelkfoje por multaj tagoj. Kaj post la ordinara klubkunveno, kiam oni pensis pri hejmeniro, ni ĉiam povis vidi Jenny en bona humoro en la kuirejo kune kun aliaj virinoj purigante la kaftasojn kaj telerojn.

Povl mortis en 1991, sed Jenny restis fidela al Esperanto. Ŝi partoprenis en la klubkunvenoj tiel longe, kiel ŝi povis. Kaj multajn monatojn antaŭ sia morto, ŝi interparolis en la maljunulejo kun du nederlandaj virinoj, kompreneble uzante la Internacian Lingvon.

Nun varma homo ne plu estas inter ni, sed ni, kiuj renkontis Jenny, longe gardos la memoron pri ŝi.

Hans Halager

Jenny Jørgensen, Århus, mortis la 23-an de oktobro 2003 en la aĝo de 90 jaroj. Ŝi estis honora membro kaj de la landa organizaĵo – Dana Esperanto-Asocio kaj de la loka Esperanto-klubo en Århus. Antaŭ 12 jaroj mortis ŝia edzo – Poul Jørgensen, la multjara kasisto de DEA. Jenny apogis la agojn de li – cetere ĉiujn Esperanto-rilatajn aferojn. Ŝia helpemo estis senlima. Niaj kondolencoj iru al Klaus kun filino kaj al Lars, lia edzino Else kaj iliaj 3 infanoj. Jenny ripozu en paco!

Jytte Sunekær

Unu el la plej varmaj koroj en nia Esperanto-klubo ĉesis bati! Ni tre bedaŭras tion, sed tia estas la vivo.

Por ni, du polaj enmigrintoj, Jenny kaj Povl Jørgensen estis speciale proksimaj personoj. Ekde nia alveno al Århus en aŭgusto 1970 ili helpis nin. Dank'al ilia senlima gastameco, helpemo kaj Esperanto-animo ni ne sentis nin solaj. Ni havis niajn “Esperanto-gepatrojn” en tiu nova patrujo. Niaj gepatroj en Pollando mortis antaŭ kelkaj jaroj. Nun ni perdis la lastan eron de la “Esperanto-gepatroj”, sed ili restos en nia memoro por ĉiam!

Ni sendas elkorajn kondolencojn al Else kaj Lars Jørgensen kun infanoj kaj al Klaus Jørgensen kun filino.

Jenny kaj Povl Jørgensen ripozu en paco!

Henryka kaj Stanisław Mielczarek

Komitato por eksperimentado de la Internacia Lingvo en EU

Giorgio Pagano, la sekretario de la radikala Esperanto-Asocio, kaj la itala Radikala Partio invitis cent esperantistojn el ĉiuj landoj de la Unio partopreni starigon de komitato por eksperimentado de la Internacia Lingvo la 7-an kaj 8-an de decembro en Bruselo ĉe la Eŭropa Parlamento. En la tagordo de la konferenco estis diversaj punktoj el la agado de Radikala Partio de Italio, sed la ĉefaj punktoj de la tagordo estis subteno ke Esperanto estu enkondukata kiel lernfako en eŭropaj lernejoj.

Danio estis reprezentata pere de Bent Holm el Århus, kiu reveninte el Bruselo raportas jene:

Partoprenis entute 400 delegitoj de 25 landoj kaj inter ili 60 esperantistoj el 14 eŭropaj landoj. La aranĝo estis parto de la konferenco de Itala Radikala Partio. Dum la tuta konferenco estis Esperanto-interpretado. Tio signifas ke la unuan fojon en la historio de Eŭropa Parlamento okazis simultanaj tradukoj el kaj al Esperanto. El ok raportprelegoj du temis pri Esperanto. La speciala punkto pri la Komisiono favore al Esperanto

daŭris du horojn posttagmeze kaj unu horon vespere ĝis noktomezo. La du antaŭviditajn paroladojn pri la temo de komuna eŭropa lingvo faris la sekretario de la radikala Esperanto-Asocio Giorgio Pagano kaj prof-ro Bujdoso de la Universitato de Budapeŝto.

La ĉefa rezulto de la Kunveno rigarde al Esperanto kaj tial tre interesa por la esperantistoj estis la kreo de “Komitato por la eksperimentado de la Internacia Lingvo ene de Eŭropa Unio”, kiu preparos proponon pri eksperimenta enkonduko de Esperanto en la klerigan sistemon de Eŭropo.

Ni aldonas ke laŭ nia informo neniu ĉeestis flanke de UEA kaj de Brusela Komunikadcentro pro neŭtraleco. Ankaŭ DEA restas fidela al la statuto pri neŭtraleco, sed estis tamen interese kaj inde observi kio okazis en Europa Parlamento la 7-an kaj 8-an de decembro kaj estonte sekvi la rezultojn de la Komitato.

I. Schröder

Zamenhof-tago tutmonde festita

Saluto de la prezidanto de UEA

Karaj geamikoj,

io estas iom aparta pri la ĉi-jara tradicia Zamenhof-tago, konata ankaŭ kiel tago de la Esperanto-libro kaj ankoraŭ laŭ aliaj nomoj.

Dum la lasta semajno ĉiutage venas informoj el ĉiuj anguloj de la mondo pri la festado de ĉi tiu okazo, kiu laŭ la landoj kaj la lokaj kondiĉoj okazas iom pli frue aŭ iom malpli frue.

Povas simple esti, ke temas pri pli facila komunik-ebleco pro la reto, sed povas ankaŭ esti ke ĉi-jare la festo estis pli sentata, ĉar ĝi iĝis vera popola festo en Esperantujo, celebrata ĉiuloke per solenaj manĝoj kaj aliaj agadoj diversspecaj, kelkaj ankaŭ inform-celaj, kelkaj iom folkloraj, kiel la ekbruligo de verdaj kandeloj, agado lanĉita en Francujo, aŭ la disvastigo de poŝtkartaj salutoj al siaj eksterlandaj korespondantoj, ktp.

Sed vere ne restis loko kun esperantistoj, de Danlando al la urbo Meksiko, de Japanujo al Riodejanejro, kie ne okazis io. Se la Esperantomovado havas problemojn, tio tute ne estas evidenta el la juneca viglo de nia “popola festo” tra la tuta mondo. Mi vere ne povas kompreni, kial ĉi-jare la afero estis tiel impona.

Al ĉio aldoniĝas nun la propono de kelkaj esperantistoj agi por ke ĝi iĝu “Monda tago de Esperanto”, deklarita de internaciaj instancoj. Ĉi tiu tuta fervoro de la esperantistoj ĉirkaŭ ĉi tiu festo vere meritas, ke oni agnosku ĝin. Tion mi provas fari nome de Universala Esperanto-Asocio per ĉi tiu mesaĝeto, kiun mi ankaŭ sendos al ĉiuj tiuj, kiuj aparte sendis al mi bondezirojn en la lastaj tagoj, kiel kolektivan respondon sed tamen kun individua danko al ĉiu aparte.

Bonan Zamenhof-tagon al vi ĉiuj!

Renato Corsetti en [komitato-de-uea]

EU-konstitucia projekto en Esperanto

La projekto de eŭropa konstitucio estas iom post iom legebla en Esperanto ĉe <http://eu-esperanto.inf.hu> kaj ĉe <http://eu.inf.hu>.

Kvankam la plejparte hungara tradukista laborgrupo atentigas ke la teksto ‘estas tradukita el la hungara varianto’, okazis iagrada komparo kun kaj adapto al la fontolingvoj franca kaj angla. La perspektiva celo estas paralele eldoni la tekston en la hungara kaj Esperanto.

István Ertl en [lingva-demokratio]

Esperanto-manifestacio en Strasburgo

Dum 2004, Eŭropa Unio pligrandiĝos kaj ankaŭ okazos eŭropaj balotoj. Tamen, la lingva problemo restas ne solvata, sed kaŝita per pseŭdo-multlingvismo favore nur al la 3 pli potencaj lingvoj.

Por atentigi pri tiu fakto, nombro da organizaĵoj, unuavice de francaj esperantistoj, organizas manifestacion por lingva demokratio en Eŭropo. La ĉefa celo de tiu agado estos paroligi kiel eble plej vaste (i.a.

tra la amaskomunikiloj) pri la lingvaj aspektoj de Eŭropo por tiel konsciigi la publikon pri tiu problemo... kaj fine eble iel movebligi la politikistojn!

Por havi veran efikon, ni devas esti sufiĉe mult-nombraj kaj buntaj. La manifestacio okazos la 9-an de majo en Strasburgo. Pli da informoj haveblas en multaj eŭropaj lingvoj per la retpaĝo europa.bunto.free.fr.

28a Internacia Junulara Festivalo (IJF)

Temo: “Muziko kunigas homojn”

IJF estas unu el la plej ŝatataj junularaj renkontiĝoj en tuta Eŭropo. Oni spiras la specialan Esperantan bonetoson, miksaĵo de amikemo, ĝuado, respekto de malsameco. Partoprenas kaj fluparolantoj kaj komencantoj, kaj vi ege facile amikumos kun geitaloj kaj eksterlandanoj.

IJF okazas ĉiujare en Italio, venontfoje de la 7a ĝis la 13a de aprilo 2004, sur la toskan-emiliaj apeninoj, en Abetone (PT). Oni povas partopreni kiel plenkotizanto au memzorganto. Helpe de vi ni faciligos al la partoprenantoj vojaĝi eksterlanden: informiĝu ĉe la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de via ŝtato pri la protokoloj kaj kontaktu nin.

Ĉiujare la Itala Esperanto-Junularo elektas temon por la Festivalo, pri kiu oni prelegas, diskutondas, laborgrupas. La distra programo trakteblas en la nokta universitato. Dumtage oni povas elekti kursojn pri dancado, pentrado, memdefendo, ktp. Ofte okazas kursoj pri la itala kaj pri Esperanto, por komencantoj kaj progresintoj. Dum la vespera programo ofte okazas: koncerto, teatraĵo, internacia vespero, dumnokta promenado en la urbo, ktp. Funkcias dum la tuta nokto la trinkejo, la dancejo kaj la gufujo.

Aliĝu rekte per la retpaĝo iej.esperanto.it/ijf/2004 aŭ skribu al ijf.admin@esperanto.it por kromaj informoj.

Nicola Ruggiero en [landa agado]

Internacia Semajno de ‘Eniro al Tibeto’

Ni kore invitas vin partopreni en “Internacia Semajno – Eniro al Tibeto” en 2004. Dum la aktivado, ni eblege prezentas al vi kulturojn kaj historiojn de Tibeto, kaj per hada-oj sanktaj kaj puraj bonvenigos vin vizitadi mistermontojn kaj sanktlogojn sur firsto de la mondo. En la Internacia Semajno (01-07/08) post la 89-a UK ni prezentos al aliĝantoj 5 itinerojn kaj 11-gradajn prezojn. Organizantoj estas Xi’an Zhiyuan Kultura Firmao kaj la turismaj oficejoj de Xi’an kaj Tibeto. Pliaj informoj haveblas ĉe s-ro Zuo Jun, Xi’an, Ĉinio, rete: partnero@pub.xaonline.com.

Zuo Jun en [NUN]

Pri la 89a Universala Kongreso de Esperanto (24a-31a de julio 2004) vidu cetere la retpaĝon www.espero.com.cn/uk2004/e02-2.htm.



“Aroma Jalto” 2004

Poul Kry Poulsen el Ringsted atentigis nin pri ĉi tiu “tradicia lingva Esperanto-festivalo”, kiu okazos inter la 1-a kaj 9-a de majo en Jalto, urbo sur la ukraina duoninsulo Krimeo. La programo konsistas el diversnivelaj kursoj kaj ekskursoj, krom aliaj korpaj kaj intelektaj ekzercoj. La 11-membra organiza komitato admonas ke la “lingva ordo” estos “tradicie severa – nulaj komencantoj ne estas akceptataj”. Ĝis la 1-a de marto aliĝo de okcident-eŭropano kostas 15 eŭrojn, post tiu dato oni devos pagi 30 eŭrojn surloke. Aliĝi kaj pli detale informiĝi eblas per la retpaĝo www.aromajalta.by.ru/aj-2004/, sed ankaŭ eksterrete ĉe:

Volodimir Viktoroviĉ HORDIJENKO
p.k. 35
Kijiv-133
UA-01133, Ukrainio.

William Auld kandidato por Nobelpremio



*Foto de Auld el
[www.geocities.com/
esperantolit](http://www.geocities.com/esperantolit)*

La 1-an de februaro en Stokholmo finiĝos la kandidatiga periodo por akcepto de novaj kandidatoj por Nobelpremio pri literaturo.

Kiel en la antaŭaj jaroj Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) ankaŭ por 2004 proponis kiel kandidaton William Auld. Tio estas la kvina jaro ke Auld regule fariĝas kandidato por la Nobelpremio pri literaturo. Ĉar laŭ la regularo de la Nobelpremio ankaŭ profesoroj pri literatura kaj lingvaj fakoj rajtas proponi kandidaton, la ĉi-jaran kandidatigon de Auld subtenis kandidatigaj leteroj de universitataj kaj altlernejaj profesoroj el Britio, Italio, Hinda Unio, Kroatio kaj Usono.

Ĉiujare alvenas al Stokholmo ĉ. 350 kandidatigaj proponoj. La Komitato unue forigas la kandidatojn kies proponantoj ne havas rajton proponi. La premion la Sveda Akademio elektos el ducento da kandidatoj en oktobro.

EVA kolektas informojn pri aktualaj profesoroj pri lingvoj kaj literaturoj kiuj emus kunlabori por la kandidatigo.

Spomenka Štimec en [komitato-de-uea]

Esperanto-ĵazo trafas furorliston

La eniro de albumo en furorliston (angle ‘top ten’) estas la kutima kriterio por pritaksi, ĉu muzikalbumo estas komerce sukcesa aŭ ne. En aŭgusto la usona ĵazisto Rick Braun eldonis sian plej freŝan albumon kun la titolo ‘Esperanto’. Intertempe la albumo atingis la kvaran rangon en la vendolisto de ĉi-tempaj ĵazalbumoj.

Legu pli pri Rick Braun kaj lia albumo ‘Esperanto’ ĉe la anglalingva muzikportalo Jazznation.com:

www.thejazznation.com/Ovations/RickBraun.htm, aŭ ĉe la retpaĝo de la kantisto mem: www.rickbraun.com/.

El [esper-inform]

Anonco

El la bretaro de via Libroservo

Finfine!

Se vi havas aliron al la reto, vi povas nun serĉi deziratajn librojn sur
www.esperanto.dk

Sub libroj (bøger) vi trovos referencojn al
litteratur - literaturo
lærebøger - lernolibroj
børnebøger - libroj por infanoj
kaj stoklistojn de nia bretaro.

Ankaŭ la mendkondiĉoj kaj -informoj estas tie troveblaj.

Ni atendas viajn mendojn !

Nun ni donas 10% rabaton al la sekvantaj libroj:



La Spleno de Parizo kr. 75.-

Tiel profunda estas la nokto
kaj

Så dyb er natten
2 libroj - dane kaj esperante kr. 40.-

Esperanto programita
4 libretoj kr. 80.- (-20% rabato)

Amike
Libroservo de DEA
Arne Casper